66-a jaro n-ro 195 2025:5

la lampiro

Cícero Soares

intervjuo

Furora eldono de EASP



Suspensa romano originale verkita en Esperanto kun dekkvino da belaj ilustraĵoj tutpaĝaj.

Malnovaj Leteroj

La domo de Katarino staris kiel silenta atestanto en la lokaĵo kvartalo de Rojnes. Grandega artdiskora konstruaĵo kun alloj fenestroj kaj fera pordego ĵaŝte la tiro de loko kie mi asendas trovi valoraĵo sekretaĵo. Mi momentis mian dentktivas misignon al la policisto garde garanta ĉe la entreja, rimarkante ke li estas nova. Bone. Ju malĝi da homoj kiuj memorus miajn virtojn, des pli bone.

"Vi havas ensu horon, inspektoro," li diris, malfermante la pordon. "Poste la teknika teamo revenos."

Mi kaŭjeis, jam kalkulante en mia memo. Una horo estas sufiĉa – mi jam estis preĉire kie serĉi.

La interno de la domo estis eleganta sed malvarma, plena je antikvaj meblaĵ kaj artaĵoj. Maj paŭej resonis sur la marmora planko dum mi iris rekte al ita privata studio. Ne estis tempo por subtiluco – mi ĉeviś trovi tiuje leteroj antaŭ ol iu alia.

31

Per aĉeto de ĉi tiu verko vi subtenas la Edukan Fonduson de **Programo Mia Amiko** ĉe EASP, ĉar 80% de la vendoj iras rekte al ĝi.

easp.org.br/butiko

Enhavo

4 **Vortoj de la redaktanto**
Ekzemplodona

5 **Esplorangulo**
Ĉu Sankta Maksimiliano Kolbe estis esperantisto?

8 **Kino kaj aliaj artoj**
La Baleno

9 **Iom da humuro**
La tomato

11 **El mia vidpunkto**
Kiel gajni monon interrete

12 **kovrilartikolo**
Intervjuo kun Cícero Soares

14 **Recenzo**
Leginda klasika libro el orienta tradicio

16 **Edukado**
Filozofio, Sociologio kaj la Idealo de Homaro: konsideroj inter la 19-a kaj 20-a jarcentoj

19 **Iom da filozofio**
Feliĉo: ĉiuj ĝin deziras, kiom da ĝin konkeras?

22 **Rakonto**
Huljo

27 **Recenzo**
La ribelema raŭpeto

28 **iom da gramatiko**
Participo kun substantiva finaĵo

31 **Iom da poezio**
Poemoj de Jarina Ĉomohuz

33 **Eltiraĵo**
Poeto ja, Di-alvoko: malmodera Dorvalino Sen-Nocio

la lampiro

66-a jaro n-ro 195 2025:5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo
Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo
Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro
Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro
Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto
Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2025

Simpla Membro	R$ 200,00
Subtena Membro	R$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R$ 100,00

Ekzemplodona

Paulo Sergio Viana

En ĉi tiu numero de nia revuo ni denove proponas valorajn tekstojn. Kaj apud la kutimaj regulaj kontribuantoj (dankon al ili!) hodiaŭ ni havas specialan intervjuon donitan de eminenta brazila Esperantisto, Cícero Soares, el la ŝtato Bahia. Li estas tre aktiva en nia landa movado. Tute grava estas ekzemple lia kunlaborado por la daŭra aperigado de la tradicia revuo Brazila Esperantisto. Li partoprenis la lastan kongreson de EASP en la urbo São José dos Campos kaj kontribuis per brila prelego kaj kantoj. Mi estas certa, ke la sinteno de Kikero povas inspiri aliajn gesamideanojn. Liaj fideleco, kohereco kaj bona humoro, kiel ano de transnacia kulturo, estas ekzemplodonaj.

Pro lia sindonemo kaj preteco respondi al ni, ni kore dankas.

Bonan legadon.

Ĉu Sankta Maksimiliano Kolbe estis esperantisto?

Miguel Bento

La 15-an de Majo 2022 estis kanonizita la unua sanktulo, kiu parolis Esperanton: Tito Brandsma (1881-1942). Pri li ekzistas tuta libro en nia lingvo, eldonita de IKUE en 2023: "Titus Brandsma – Sanktulo Esperantisto", de Fernando Millán Romeral, en traduko de la brazilano Milton Paulo de Lacerda – kolego ĉe la paĝoj de La Lampiro.

Tamen siatempe iuj homoj plendis, ke tiu honoro fakte apartenas al alia martiro de la Dua Mondmilito: Sankta Maksimiliano Kolbe (1894-1941), kanonizita multe pli frue, la 10-an de Oktobro 1982. Aliaj replikis asertante, ke Kolbe fakte ne estis esperantisto, t.e. ne lernis la lingvon, sed nur havis favoran opinion pri nia afero. Mi do ekscivolis kaj decidis esplori por eltrovi, kia efektive estis la rilato de Kolbe al Esperanto.

Tiu esploro montriĝis ne tute facila: ekzistas sufiĉe multaj tekstoj pri la



Maksimiliano Kolbe , 1936.

temo, el kiuj kelkaj eĉ pretendas doni iom detalajn informojn pri agoj aŭ diroj de Kolbe subtenaj al Esperanto, sed en preskaŭ ĉiuj tute mankas fidindaj fontoj por bazi la enhavon. Evidente kelkaj rakontoj estas troigitaj: tio estas atendebla. Sed kio en ili estas vera?

Post longa (sed certe ne elĉerpa) serĉado, mi sukcesis trovi nur du konkretajn diraĵojn de Kolbe, kiujn oni povus konsideri subtenaj al Esperanto. En pluraj lokoj eblas trovi tiujn citaĵojn kune, kaj ambaŭ ili estis gravuritaj sur memortabulo, inaŭgurita en 1974 en la Baziliko de Niepokalanów (Pollando).

"Kavaliro Esperanto trovus certan sukceson eĉ ĉi tie en Japanujo": temas pri "Kavaliro de la Senmakula" (Rycerz Niepokalanej), revuo kiun Kolbe kreis kaj eldonis (kaj kiu ekzistas ĝis nun!). Oni tamen rimarku, ke la vorto "certa" ĉi tie estas iom ambigua: ĉu la sukceso estas "nedubebla" (dua signifo en PIV) aŭ "iu difinita" (tria signifo en PIV)? Ŝajnas al mi, ke la lasta signifo estas la ĝusta, kaj tion indikas la anglalingva traduko de la plena verkaro de Kolbe (Nerbini International, 2022). Demandite de mi, la konata pola esperantisto Tobiasz Kubisiowski informis, ke ankaŭ en la pola la frazo estas iom ambigua, sed li same opinias ĝusta la sencon "iu difinita". Mi tamen ne povis konsulti pollingvan eldonon de la verkaro de Kolbe, do mi ne povas garantii, ke la frazo sur la memortabulo estas la originala (kaj ne retraduko).

Bildo el Espero Katolika (jan/1975)

En sia letero Kolbe aludis al la eblo paralele eldoni la revuon en pluraj lingvoj, en pli aŭ malpli frua estonteco: li do opiniis, ke ankaŭ versio en Esperanto povus trovi sian legantaron, t.e. li konsciis, ke la Esperanto-komunumo ne estas tro eta por tio. Bone, sed laŭ mi estas troigo diri, ke per tiu frazo Kolbe esprimis subtenon al Esperanto.

Aliflanke, la dua frazo estas pli rekta: "Via partopreno en la Esperantomondmovado plaĉas al la Senmakula". Tamen, mi ne trovis ĝin en la verkaro de Kolbe nek en iu alia plene fidinda, bone dokumentita fonto – se vi trovis, bonvolu sciigi min! Kompreneble, povas esti ke mi ion pretervidis, kaj certe eblas, ke tiu diraĵo estas aŭtenta, malgraŭ la manko de neriproĉebla fonto. Sed sen konkreta bazo ne povas esti certeco. Kaj ĉiuokaze restas la demando, ĉu vere tio estus forta subteno, aŭ ĉu simple ĉio kio ne estas malbona "plaĉas al la Senmakula"...

Dum la priserĉado de la plena verkaro de Kolbe aperis krome alia interesaĵo. Jen fragmento el letero de Kolbe al Florian Koziura, kiun mi tradukis el la angla: "Mi kredas, ke *iam* la MIŝ. [*Internacia* Milico de la Senmakula] uzos tutmondan lingvon, ekzemple Latinon – tiam la "ŝ." de la akronimo ŝanĝiĝos al "M" aŭ "G" aŭ io simila. Ne estos "fremda lando" por tiu lingvo, escepte en la postmorto, ĉar ĝi estos tutmonda lingvo: ĉiuj nacioj estos en la sama nivelo." Ĉu simpatianto de Esperanto ne devus ĉi tie mencii nian lingvon?

Laste, sed ne balaste: oni povas libere konsulti en la interreto malnovajn numerojn de la revuo "Kavaliro de la Senmakula"(*). Rapida priserĉo malkaŝas kelkajn malgrandajn menciojn de Esperanto: noton pri Esperanta geedziĝo (jan/1927), noton pri Esperanto-kongreso (sep/1927) ktp. Troveblas eĉ la jena neatendita sciigo: "Estis kreita nova internacia lingvo, Occidental, pli facila ol Esperanto" (jan/1928)...

Je mia surprizo mi do konkludis, ke Sankta Maksimiliano Kolbe ne nur ne estis esperantisto, sed eĉ ke mankas firma fundamento por aserti, ke li subtenis nian lingvon. Sed, evidente, la situacio povos ŝanĝiĝi se aperos novaj fidindaj fontoj – ĉu vi povas trovi ilin?

(*) archiwum.rycerzniepokalanej.pl/archiwum.

La Baleno

Anna Lobo de Carvalho

Originala nomo: The Whale
Direktoro: Darren Aronofsky
Aktoroj: Brendan Fraser, Sadie Sink, Hong Chau kaj Samantha Morton
Lando: Usono
Tipo: Psikologia Dramo
Lanĉo: 04.09.2022 (Venecio) 09.12.2022 (Usono)
Tempodaŭro: 117 min

Mi volas paroli pri tre intensa filmo. Mi spektis ĝin antaŭ iom da tempo sed ĝi ja lasis sian markon. Mi kredas ke ĉiuj kiuj ĝin spektis konsentas kun mi pri tio. Do, ne estas senkiale ke la filmo sukcesis iujn premiojn, ĉefe tiun de “la plej bona aktoro” en Oscar de 2023.

Unue mi devas komenci pri la ĉefa aktoro de tiu filmo. Ĉar post multege da tempo for de la ekranoj de la kinejoj pro malbona perforta situacio kiu okazis al li, Brendan Fraser revenas kaj tre brila. Tio jam estas venko laŭ mi, li vere meritis tiun premion.

La filmo do rakontas pri Charlie, intruisto de literaturo kaj angla lingvo, kiu trapasas grandajn malfacilaĵojn en sia vivo. Unua problemo estas la pezo. Li havas trodikecon pro malfacilaĵoj en la vivo, kiuj ekis ĉefe post granda perdo. Samtempe, li havas malbonan rilaton kun siaj filino kaj eksedzino.

La nura bona afero en tio ĉio estas Liz, lia amikino, kiu vizitadas kaj klopodas lin helpi kiel ŝi povas.

(Daŭrigota sur la paĝo 10)

La tomato

Luís Fernando Veríssimo

Kristoforo Kolumbo ekzamenis la tomaton, kiun indiĝeno donis al li kaj la navigisto ekkriis:

— Pomo el oro!

La tomato brilanta sub la suno de ĵus trovita Ameriko ŝajnis al la admiralo sovaĝa pomo. Kolumbo demandis la indiĝenon al kio tio utilas.

— Salatoj — respondis la amerikano. — Stufaĵoj. Saŭcoj.

Kolumbo tuj pensis pri sia itala avino, kiu kuiris la spagetojn, kiujn Marko Polo venigis el Oriento, sed ŝi ĉiam plendis, ke mankas io.

Kolumbo malkovris, krom Amerikon, tion, kio mankis al la pastaĵo de la avino. La indiĝeno demandis kion Kolumbo donos al li interŝanĝe al la tomato, kaj Kolumbo donis al li strason.

Kiujn pliajn novaĵojn la indiĝeno havis por proponi? Terpomon. Kolumbo antaŭsentis pomfritojn, terpomajn buletojn kaj rostaĵojn, metis la terpomon en sian sakon kaj insterŝanĝe donis speguleton.

Kion plian? La frukton de kakaoarbo, de kie venis la ĉokolado, kun gravaj sekvoj en la mondhistorio, speciale en Svislando kaj Bahio. Kaj Kolumbo interŝanĝis la kakaon kontraŭ plia speguleto.

Kion plian? Tabakon. Post nelonge ĉiuj provis la delicojn de tabako kaj la nova kutimo disvastiĝis. Kiel bonuson, la indiĝeno aldonis al la pakaĵo kokaplanton, kiu faris eĉ pli grandan sensacion.

Kion plian? Maizon. Maniokon. Papagojn. "Kaj tiu ringo, kiun vi havas en la nazo. Ĉu ĝi estas el oro? Donu."

Kaj Kolumbo ordonis al siaj homoj rikolti ĉiujn orajn ringojn, kiujn ili trovos kaj, se necese, venigi kune la nazojn. Interŝanĝe li proponis pli da strasglobetoj, kiujn la indiĝeno rifuzis. Li proponis pli da strasoj. Moneretojn. Ŝlosilringojn. Busbiletojn. La indiĝeno ĉion rifuzis. Ĉar estis neeble venki la invadintojn per armiloj, la indiĝeno malbenis Kolumbon kaj malbondeziris. Ke la terpomo faru lian genton grasdikega, la ĉokolado plenigu liajn arteriojn per kolesterolo, la tabako estigu en li kanceron, la kokaino lin frenezigu kaj la oro detruu lian animon.

Kaj la tomato fariĝu keĉupo.

Esperantigis: James Rezende Piton

Daŭrigo de la pago 8 La Baleno

Oni vere eniĝas en tiu malbona situacio de la filmo kaj akompanas Charlie en siaj malfacilaĵoj en ĉiutaga vivo, lia rilato kun manĝaĵoj, liaj konfliktoj, liaj personaj rilatoj kun Liz, lia filino Ellie kaj lia eksedzino Mary.

Fakte, unu grava punkto de tiu filmo estas, laŭ mi, helpi al la spektanto ankaŭ ne juĝi aliajn laŭ la korpo kaj kompreneble havi empation ĉar oni neniam scias kion la alia trapasis aŭ trapasas. Alia grava punkto kiun ĝi montras estas la graveco de la konektoj, de la rilatoj por la vivo, tiel ke ni ne estas insuloj, sed homoj.

Nur unu lastan aferon mi volas diri pri ĝi – Mi imagas ke Charlie vere sentis sin kiel baleno, sed kiu imagus ke alia baleno de la literaturo helpus lin je tiom emociiga maniero? El tio devenas la nomo de la filmo, mi kredas.

Mi esperas ke mi instigis vin spekti tiun ĉi tre intensan, emociigan kaj belegan filmon! Venu ankaŭ akompani iom de la vivo de Charlie! Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Kiel gajni monon interrete

Luís Euclides dos Santos

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, estis eble gajni multe da mono interrete kiel sendependa laboristo. La profesiistoj servis klientojn el la tuta mondo kaj povis esti pagitaj per dolaroj kaj eŭroj. Kelkaj el la plej ordinaraj laboroj estis tradukado, redaktado, instruado kaj programado.

La tradukistoj povis labori por tradukaj agentejoj, eldonejoj, rektaj klientoj, k.t.p., la redaktistoj povis labori por eldonejoj, firmaoj, k.t.p., la instruistoj povis instrui tiujn, kiuj volis lerni la plej diversajn temojn, ekzemple, lingvojn, matematikon, biologion, k.t.p., kaj la programistoj povis labori por teknologiaj firmaoj, ekfirmaoj, k.t.p.

Tio okazas ankoraŭ nuntempe. Tamen, pro la evoluo de AI, la laborŝarĝo de kelkaj el tiuj profesioj malpliiĝis multe. Ĉe tradukado, ekzemple, eĉ se la fina rezulto ne estas perfekta, kelkaj klientoj preferas uzi AI-on kaj poste dungi tradukiston por revizii la tekston.

Malgraŭ tio, se oni kombinas du aŭ pli el tiuj laboroj, estas ankoraŭ eble gajni sufiĉe da mono. Krome, tiuj, kiuj regas programadon povas ankaŭ labori kun algoritma *trading*, kiu konsistas en plenumi intertraktadojn en la financa merkato tra la interreto.

Tial, kvankam nuntempe estas pli malfacile gajni monon interrete kiel sendependa laboristo en kelkaj profesioj, novaj manieroj fari tion ĉiam aperas. Oni devas, interalie, observi la tendencojn de la merkato kaj ĝisdatigi siajn lertecojn konforme al ĝi.



Intervjuo kun Cícero Soares

CÍCERO SOARES estas tre elstara aktivulo por Esperanto, en Brazilo, jam de plura jaroj. Li loĝas en la brazila ŝtato Bahia, kaj vigle instruas kaj movadumas tutlande. Antaŭ nelonge li partoprenis en la E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo, kaj tie prelegis kaj kantis. Li iam kunlaboris en la agado de Brazila Esperantista Junulara Organizo kaj Brazila Esperanto-Ligo. Nuntempe, li kunredaktas la tradician revuon Brazila Esperntisto. Mi kore dankas, ke li akceptis respondi kelkajn demandojn.

Kiam kaj kie vi naskiĝis? Kiam vi eklernis Esperanton? Kio motivis vin al tio?

Mi eklernis Esperanton ankoraŭ kiel adoleskanto, en la komenco de la 1980-aj jaroj. Amiko parolis al mi pri tiu mirinda novaĵo kaj provizis min per bonintencaj, sed misaj informoj. Kelkajn tagojn poste, mi aliĝis al la sama kurso, kiun li jam frekventis de kelkaj semajnoj. La lingvo tuj ensorĉis min, kvazaŭ mi revenis al konata lando. Kompreneble, la amiko ne finis la kurson, sed mi, fininte ĝin, estis invitita instrui bazan kurson jam en la sekva jaro.

Kia estas via sperto kiel redaktoro de Brazila Esperantisto?

Querino Neto invitis min partopreni kandidatiĝon por la estraro de BEL. Mi rifuzis tion kaj klarigis al li, ke mi estas kvazaŭ simpla fabriklaboristo. Al mi ne plaĉas instituciaj postenoj, sed mi akceptis zorgi pri Brazila Esperantisto. Mi reorganizis ĝin, kreis kelkajn fiksajn rubrikojn por faciligi la kontribufluon kaj intencis disvastigi niajn literaturajn gravulojn per ĝi. La laboro montriĝis tre peniga, malgraŭ la valora kunlaboro de James kaj Josenilton pri la reviziado. Tamen, ĉiam mankis materialo por publikigi, do mi mem devis verki grandan parton de ĉiu numero.

Kiu estas via ĝenerala taksado pri la nuntempa brazila kaj internacia Esperantomovado? Kio mankas al ĝi?

Mi estas iom for de la gvidaj aspektoj de la movado. Mi estas kvazaŭ raŭmista finvenkisto. Mi laboras por la fina venko, sed mi ĉiam ĝuis Esperanton per tio, kion ĝi jam ofertas al mi. Mi por du fojoj faris ok-semajnan vojaĝon kun tornistro surdorse tra Eŭropo, de kongreso al renkontiĝo, de gastiganto el Pasporta Servo al hazarda konato el iu Esperanto-aranĝo. Esperantujo ĉiam alportis al mia vivo pli ol kiom mi klopodas redoni al ĝi.

Vi ofte rekomendas la "Naturan Metodon" por lernado de Esperanto. Ĉu vi bonvolus resume klarigi, kia ĝi estas?

Vere, mia ĉefa sperto kiel instruisto devenas de la Ĉe-metodo! Mi instruis kaj disvastigis ĝin ekde miaj komencaj jaroj. Dum la pandemio, tamen, Izabel kaj mi, ambaŭ el Bahia Esperanto-Asocio, bezonis metodon taŭgan por interretaj kursoj. Mi jam studis la latinan per la naturmetodo, tial mi konis ĝiajn avantaĝojn. Hazarde, vizitante nian riĉan Bibliotekon Carlos Domingues, mi trovis similan metodon por Esperanto. Mi intencas verki artikolon pri tiu metodo, do mi lasos la detalojn por ĝi.

Kiu estas via preferata aŭtoro en Esperanto? Komentu pri tiu.

Ho, ve! Multaj aŭtoroj ravas min en Esperantujo. La brilaj eseoj de Waringhien, la amuzaj noveloj de Johan Valano, la delikata vidpunkto de Spomenka Štimec, la emociigaj poemoj de Kalocsay, Auld kaj Boulton... Kiel ne amuziĝi ĝisride per Kredu Min, Sinjorino de Rosetti? Kaj kion diri pri la tradukoj de Kabe kaj de nia brila Porto Carreiro? La esperanta literaturo estas mia amata ĉevaleto!

Bonvolu sendi mesaĝon al la brazila Esperantistaro.

Mi pensas, ke Brazilo enprofundiĝis en perdon de kulturaj kaj edukaj valoroj dum la lastaj jardekoj. Iu ajn, kiu estas pli ol kvindekjara, facile povas rekoni la filistecon de tiu epoko. Oni ne plu plendas, ke brazilanoj legas malmulte, sed ke ili ne plu komprenas, kion ili legas. Kompreneble, analfabeta generacio ne estos utila grundo por kulturaj valoroj. La brazila Esperantistaro devas duoble nutri sian esperon, certa, ke la mondo iras laŭ cikloj, kaj post la plej malluma ŝtormo ĉiam ekaperos brila, reviviga suno.

Leginda klasika libro el orienta tradicio

Paulo S. Viana

Religiaj verkoj ne interesas nur religiemajn homojn. Ili povas konsistigi tiel vastan trezoron en literatura formo, ke ili influas kaj muldas la menson de tutaj socioj. La Sankta Biblio estas tipa ekzemplo. Oni povus aserti, ke la okcidenta kulturo estas fortege impresita de tiuj dekoj da kunmetitaj libroj, kiujn kredantoj kaj nekredantoj trovas foje tute strangaj... La Nobla Korano, Tao-Te-King kaj aliaj ĉefverkoj de la religia literaturo, efikas simile je la menso de koncernaj homoj. Estas interese kaj klerige legi ilin, klopodi kompreni kaj interpreti kun larĝa menso ilian enhavon, ĉar tio helpas koni la homojn mem. Sendepende de tio, ĉu la leganto mem estas kredanto, aŭ ne.

Bhagavad-Ghita estas tiaspeca libro. Oni devas interpreti simbolojn, de la unua ĝis la lasta paĝo, kaj ĉi tiu defio estas mem interesa intelekta ekzerco. La verko komenciĝas per tipa ekzemplo: la princo Arĝuno sin direktas al milito, sed kiam li staras preta por la batalo, li konstatas, ke liaj kontraŭuloj estas ĉiuj liaj familianoj. Memkompreneble, temas pri la bezono batali kontraŭ siaj amataj pasioj, egoismo, troa memamo, avidemo, k.s..

Sekvas dek ok nelongaj ĉapitroj verkitaj laŭ versikloj, en kiuj la plej alta Dio, Kriŝno, instruas pri la vojo al spirita altiĝo, ĝis atingo de perfekteco kaj plena feliĉo. Li instruas pri la grandi-

ozeco de Dio, pri bonfarado, pri meditado, pri liberiĝo de la homaj suferoj, pri la bezono liberiĝi de materiaj deziroj.

En la tria ĉapitro, oni trovas aparte kuriozan instruon, kiu kontraŭas la ĝeneralan antaŭjuĝon de okcidentanoj, ke la orienta jogo rekomendas nur meditadon, spite al materiaj agoj. En ĝi, Kriŝno instruas, ke agado en la mondo estas same grava kiel ĝusta pensado kaj ĝustaj sentoj. Jen la kvara versiklo de la tria ĉapitro:

"Kiu ne komencis agi, ne alvenos al ripozo;
ne atingos perfektecon, kiu restadas senaga."

Alia tre impresa ĉapitro estas la dek-unua, en kiu, post peto de Arĝuno, Kriŝno aperas al li ne en homeca formo, sed en sia tuta neimagebla grandiozeco. Arĝuno ricevas spiritan frapon, kaj tremas, kaj petas, ke tia vidaĵo malaperu de antaŭ li...

Bhavagad-Gita fakte estas fragmento (epizodo) de multe pli ampleksa verko el la hinda teologio, la sanskrita eposo Mahabharata ("La granda milito de la Bharatidoj'). Ĝi enhavas la esencon de la spiritaj instruoj de tiu religio. Ĝiaj nobleco kaj alta moralo certe meritas respekton kaj aprezon de legantoj en la tuta mondo. Jen la kialo kaj oportuneco, ke ĝi estas tradukita en nian Internacian Lingvon, rekte el la sanksrita.

La teksto en Esperanto estas flua, perfekte komprenebla kaj eĉ facile legebla. Bela omaĝo al la eminente tradukinto, unu el la unuaj Esperantistoj vivintaj en Brazilo, estus tio, ke ni legu kaj aprezu ĝin, sendepende de religiaj kredoj aŭ nekredo.



Prediko de la Diablo
kaj aliaj rakontoj
Machado de Assis
Tradukis:
Francisco S. Wechsler
easp.org.br/butiko

Filozofio, Sociologio kaj la Idealo de Homaro: Konsideroj inter la 19-a kaj 20-a jarcentoj

Patrícia Guerra

Enkonduko

La 19-a kaj 20-a jarcentoj reprezentis periodojn de intensaj sociaj, politikaj kaj kulturaj transformoj, kiuj profunde influis la formadon de homa penso. En ĉi tiu kunteksto, Filozofio kaj Sociologio establis sin kiel fundamentaj kampoj por la evoluo de kritikaj kaj pensemaj individuoj, kapablaj kompreni la defiojn de sia tempo kaj proponi vojojn por homa evoluo. La apero de novaj etikaj kaj sociaj konceptoj, kiel ekzemple Homaranismo, proponita de Ludwik Lejzer Zamenhof, ilustras la intelektan kaj praktikan klopodon konstrui homaron bazitan sur paco, harmonio kaj kunlaboro inter la popoloj.

Filozofio, ekde siaj originoj, celis kreskigi la kapablon pensi kritike, pridubi establitajn verojn, kaj proponi alternativojn al la "status quo". En la 19-a jarcento, filozofoj kiel Karl Marx kaj Friedrich Nietzsche proponis esencajn kontribuojn al la kompreno pri la individuo kaj socio. Dum Marx kritikis la kontraŭdirojn de industria kapitalismo kaj proponis la emancipiĝon de la laboristo (MARX; ENGELS, 1998), Nietzsche defiis la superregantajn moralajn valorojn kaj instigis la serĉadon de aŭtonomeco kaj superadon de la limoj truditaj de tradicio (NIETZSCHE, 2001).

En la 20-a jarcento, la filozofia pensado estis markita de ekzistadismaj kaj humanismaj pripensoj. Aŭtoroj kiel Jean-Paul Sartre kaj Hannah Arendt elstaris pro siaj pripensoj pri individua libereco, etika respondeco kaj la homa kondiĉo meze de la politikaj kaj sociaj krizoj de tiu periodo (SARTRE, 1997; ARENDT, 2010). Filozofio, tial, fariĝis

instrumento de emancipiĝo, fortigante la aŭtonomecon de penso kaj kritikan konscion fronte al maljusteco kaj subpremo.

Samtempe, sociologio, kiu aperis kiel scienca disciplino en la 19-a jarcento kun pensuloj kiel Émile Durkheim, Max Weber kaj Karl Marx, celis kompreni la mekanismojn subestantajn la modernan socion. Durkheim, emfazante socian kohezion kaj kolektivajn ligojn, proponis ilojn por konsideri solidarecon en tempoj de rapida ŝanĝo (DURKHEIM, 1999). Weber, siavice, kontribuis al kompreno de la raciigo kaj burokratiigo de industriaj socioj (WEBER, 2004).

En la 20-a jarcento, sociologio vastigis sian analizon por inkluzivi temojn rilatajn al sociaj malegalecoj, luktoj por rekono, kaj la kontraŭdiroj de malfrua moderneco. Aŭtoroj kiel Pierre Bourdieu kaj Jürgen Habermas daŭrigis ĉi tiun klopodon, vastigante la eblecojn por kritiko kaj pensado pri la konstruado de pli justa kaj demokratia socio (BOURDIEU, 1989; HABERMAS, 2012).

Zamenhof kaj homaranismo: universala etika propono

Meze de la naciismaj streĉoj kaj konfliktoj, kiuj markis la 19-an kaj 20-an jarcentojn, kuracisto kaj lingvisto Ludwik Lejzer Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ evoluigis la koncepton de Homaranismo. Ĉi tiu idealo proponis universalan etikon bazitan sur frateco inter popoloj, superante religiajn, naciajn kaj etnajn barojn, kaj valorigante la komunan homecon de ĉiuj individuoj (ZAMENHOF, 1906).

Homaranismo povas esti komprenata kiel humanisma respondo al la militoj, antaŭjuĝoj kaj dividoj, kiuj karakterizis la du koncernajn jarcentojn. Rekomendante edukadon centritan sur reciproka respekto kaj la disvastigon de universalaj valoroj, Zamenhof anticipis diskutojn, kiuj restas centraj al filozofio kaj sociologio hodiaŭ, kiel ekzemple interkultureco, homaj rajtoj kaj la konstruado de daŭra paco.

La 19-a kaj 20-a jarcentoj estis markitaj de intensaj defioj: la Industria Revolucio kaj ĝiaj sociaj kontraŭdiroj, la fortigo de nacio-ŝtatoj, mondmilitoj, la leviĝo de totalismaj reĝimoj, kaj la persisto de strukturaj malegalecoj. Alfronte al ĉi tiuj scenaroj, filozofio kaj sociologio ludis decidajn rolojn en proponado de kritikoj kaj alternativoj, kiuj celis ekvilibron inter materia progreso kaj homa disvolviĝo.

En ĉi tiu kunteksto, la idealo de paco kaj harmonio, pledita kaj de humanismaj filozofoj kaj de projektoj kiel Homaranismo, aperis kiel etika kaj politika horizonto. La disvastigo de scio, kunligita kun la evoluo de kritikaj individuoj, estis vidata kiel necesa vojo por superi perforton kaj antaŭenigi kunlaboron inter popoloj.

Finaj konsideroj

La kontribuoj de Filozofio kaj Sociologio en la 19-a kaj 20-a jarcentoj malkaŝas la centrecon de ĉi tiuj disciplinoj en la evoluo de pensemaj kaj kritikaj homoj, kapablaj disvastigi scion kaj agi por transformi la realecon. La Homaranismo de Zamenhof, en dialogo kun la grandaj filozofiaj kaj sociologiaj debatoj de sia periodo, plifortigas la bezonon de universala etiko bazita sur solidareco kaj paca kunekzistado. Tiel, se oni konsideras la defiojn de ĉi tiuj jarcentoj, la graveco de tia scio por homa evoluo ene de idealo de paco, harmonio kaj reciproka respekto fariĝas evidenta.

Bibliografiaj Referencoj

ARENDT, Hannah. La Homa Kondiĉo. 11-a eld. Rio-de-Ĵanejro: Forense Universitária, 2010.

BOURDIEU, Pierre. Simbola Potenco. Rio-de-Ĵanejro: Bertrand Brasil, 1989.

DURKHEJM, Émile. La Reguloj de la Sociologia Metodo. San-Paŭlo: Martins Fontes, 1999.

HABERMAS, Jürgen. Teorio de Komunika Agado. San-Paŭlo: WMF Martins Fontes, 2012.

MARX, Karlo; ENGELS, Friedrich. La Komunista Manifesto. San-Paŭlo: Boitempo, 1998.

NIETZSCHE, Friedrich. La Geja Scienco. San-Paŭlo: Companhia das Letras, 2001.

SARTRE, Jean-Paul. Ekzistencialismo estas Humanismo. San-Paŭlo: Abril Cultural, 1997.

WEBER, Max. La Protestanta Etiko kaj la Spirito de Kapitalismo. San-Paŭlo: Pioneira, 2004.

ZAMENHOF, Ludoviko Lejzer. Homaranismo. Portugala traduko disponebla en Esperantaj eldonoj. 1906.

Patricia Guerra Radsack



PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ. Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.

Feliĉo: ĉiuj ĝin deziras, kiom da ĝin konkeras?

José Mauro Progiante

Feliĉo estas eble la plej universala deziro de la homaro, sendepende de kulturo, kredo aŭ socia medio. Tamen, malgraŭ tiu komuna deziro, malmultaj sukcesas atingi aŭ daŭre konservi staton rigardatan kiel feliĉon.

Ekde antikvaj tempoj, filozofoj klopodis difini, kompreni kaj precipe montri kiel apliki en la vivo siajn ideojn pri tiu glitiga koncepto. Aristotelo, ekzemple, diris ke feliĉo estas rezulto de vivado laŭ virto kaj realigo de la homa potencialo. La stoikistoj opiniis, ke feliĉo devenas de interna trankvilo, ne de eksteraj cirkonstancoj, ke oni povas esti feliĉaj ne suferante pro aferoj neŝanĝeblaj.

Ĉiu persono emas krei sian propran difinon pri feliĉo, eĉ se la plejmulto ne vortumas tion. Por iuj, ĝi loĝas en profesia realiĝo; por aliaj, en reciprokita amo, sano, libereco aŭ interna paco. Estas tiuj, kiuj vidas ĝin kiel momentojn de plezuro, kaj aliaj, kiuj konsideras ĝin daŭra stato de kontenteco. Tiu diverseco de signifoj igas la serĉadon de feliĉo profunde persona kaj ofte sola vojaĝo.

Multaj homoj kredas, ke feliĉo dependas de eksteraj faktoroj: mono, sukceso, socia pozicio aŭ posedaĵoj. Estas vero, ke certaj materialaj kondiĉoj povas faciligi la vivon kaj tiel redukti streson. Tamen sciencaj esploroj montras, ke post atingo de baza nivelo de komforto, pliaj posedaĵoj ne garantias feliĉon. Oni ofte vidas riĉulojn sen vera kontento, dum aliaj, kiuj vivas modeste, montras sinceran ĝojon kaj dankemon.

Kulturo de konsumado, sociaj retoj kaj neatingeblaj normoj de sukceso kaj beleco kreas iluzion de feliĉo. Ni estas kondukitaj kredi, ke feliĉo ĉiam estas en la sekva celo, la sekva aĉeto, la sekva atingaĵo. Tiu logiko de “anko-

raŭ ne” tenas nin en konstanta malkontento, neniam sataj.

Alia faktoro, kiu malfaciligas la atingon de feliĉo, estas la komparo. Rigardante la vivon de aliaj — precipe en sociaj retoj, kie ĉio ŝajnas perfekta —, multaj sentas sin malsuperaj, frustritaj aŭ nekompletaj. La feliĉo de aliaj, aŭ tio, kio ŝajnas esti, fariĝas kruela spegulo, kiu reflektas nian mankon de memfido. Ni forgesas, ke ĉiu persono havas sian vojon, siajn defiojn kaj siajn nevideblajn dolorojn.

Tamen, ekzistas homoj, kiuj ŝajnas trovi la ŝlosilon al feliĉo. Kurioze, ili ne ĉiam estas la plej riĉaj, famaj aŭ sukcesaj. Tio pensigas, ke la vera radiko de feliĉo troviĝas interne, ke ĝi rilatas al sinteno, pensmaniero kaj kapablo aprezi la malgrandajn sukcesojn kaj simplajn aferojn, kiel matenmanĝo kun familio, konversacio kun amikoj kaj admirado de sunsubiro. Dankemo, ekzemple, estas praktiko ofte ligita al pli granda sento de bonstato. Simile, kapablo vivi en la nuna momento – sen troa zorgo pri la estonteco aŭ remaĉo pri la pasinteco – helpas konstrui pli solidan kaj daŭran senton de ĝojo.

Pozitiva psikologio, kampo kiu studas la sanajn aspektojn de la homa menso, indikas ke feliĉo ne estas unuopa emocio, sed kompleksa koncepto

konsistanta el kvin elementoj: pozitivaj emocioj, kiel dankemo, sereneco, intereso, espero kaj optimismo; engaĝiĝo en signifaj agadoj, kiuj provizas fokuson kaj uzon de personaj fortoj; pozitivaj rilatoj, en kiuj oni konstruas kaj konservas fortajn kaj sanajn ligojn; kultivo de idealo, por senti sin apartenanta al io pli granda ol si mem; kaj atingo de realismaj celoj.

Psikologoj reliefigas la gravecon de rilatoj. Amikeco, amo, familia subteno kaj komunuma sento ebligas daŭran internan ĝojon. Ne temas pri kvanto de rilatoj, sed pri ilia kvalito. Esti aŭskultata, komprenata kaj amata valoras pli ol ĉiuj materiaj atingoj.

Feliĉuloj, kiel la franca budhana monaĥo Matthiew Ricard, nomata la plej feliĉa homo en la mondo pro konkludo de neŭrosciencistoj studintaj lian cerban aktivecon, diras ke feliĉo ne estas io konkerebla, sed kultivebla. Ĝi ne estas premio, kiu atendas nin post longa vojirado, sed stato de konscio akirita laŭgrade per ĉiutagaj paŝetoj.

Verŝajne sinsekvo de signifoplenaj momentoj estas esprimo pli taŭga por difini feliĉon ol konstanta stato. Ĝia rekono postulas atenton, ĉeeston kaj emon vidi belecon eĉ meze de kaoso. Oni povas sperti feliĉon eĉ en malfacilaj cirkonstancoj, se oni trovas sencon, subtenon aŭ momenton de lumo.

En mondo, kiu puŝas nin for de ni mem, trovi feliĉon povas signifi, paradokse, reveni enen, aŭskulti tion, kio vere gravas, silentigi la eksteran bruon kaj trovi sencon en tio, kion ni faras. Revenante al la demando de la titolo – kiom da ĝin konkeras? -, la respondo povas esti “neniu”, ĉar ne temas pri konkero, aŭ povas esti “tiuj malmultaj, kiuj komprenas ke eblas estigi ĝin ene de si mem, per konscio, peno, elekto”.

easp.org.br/butiko

Negrinjo kaj aliaj noveloj

Monteiro Lobato

Tradukis:
Francisco S. Wechsler | Paulo S. Viana

Huljo

Geo Ŝkurupij

EL LA UKRAINA LITERATURO

Maljuna ĉino nomita Sun I-dzi, kiu posedis malgrandan tavernon sur Iluzia Strato kaj servis dek du pladojn en miniaturaj bovloj al siaj regulaj klientoj, la ĉinaj ŝtonistoj ĉe la konstruado de la nova mongola lernejo, havis grandan nigran hundon, kiu ĉiam kuŝis antaŭ la tavernenirejo.

La hundo de Sun I-dzi estis granda, dika hundo kun forta muzelo kaj tendenozaj piedoj. Ĝi solene promenis ĉirkaŭ la taverno, forpelante aliajn hundojn, aŭ kuŝiĝis, malestime rigardante la mallongajn mongolajn ĉevalojn, kiuj staris ĉe la tirhaltejo apud ĝi.

Fojfoje ĝi malaperis dum pluraj tagoj, kaj tiam Sun I-dzi promenis malĝoja kaj iom ĉagrenita, ĉar li sciis perfekte bone, kie vagas lia hundo.

“Huljo” estas la nomo de hundoj en Mongolio. La vorto por “hundo” en la mongola lingvo estas “noĥoj”, sed ili estas nomataj “huljo” ĉie.

Proksime de ĉiu jurto, en la ebenaĵoj, sur paŝtejoj, en la dezertoj, oni ĉiam povas vidi kelkajn pezajn nigrajn hundojn, kiuj, sufokiĝante pro kolero, salutas gaston aŭ fremdulon per bojado.

Ili estas aparte multnombraj en mongolaj urbetoj. Ili kuras en grandaj gregoj tra la stratoj kaj bazaroj kvazaŭ veraj mastroj de la urbo. Nigraj, glataj kaj sovaĝaj, malsanaj kaj maldikaj, kovritaj de krustoj kaj ulceretoj, la hundoj ĉasas kadavraĵojn, restaĵon, kaj nokte eĉ... homojn.

Kiam la nokto falas sur Ulanbatoron de la monto Bogd Ĥan Uul, ilia bojado fariĝas aparte neeltenebla. La bojado de hundoj estas speco de muziko de mongolaj urboj, simila al la

vespera kvakado de ranoj en vilaĝoj ĉi tie en Ukrainio. La bojado leviĝas al la blua ĉielo, konkurante kun la lamaj trumpetoj, kiuj muĝas laŭte kiel gigantaj bovinoj, fortimigante malbonajn spiritojn por la nokto. Kiam la lamaoj laciĝas kaj endormiĝas, tiam nenio povas haltigi la alttonan hundmuzikon, kiu kaskadas tra la dormanta urbo.

La nokta vento flirtas ĉifonojn kun hieroglifoj de preĝoj sur altaj mastoj, kiuj leviĝas kiel arbaro super la urbo, kaj tiuj preĝoj senĉese flugas, kun la vento, al Dio kune kun la kantado de hundoj.

Hundo estas granda amiko de mongola ŝafisto, ĝi gardas brutaron kaj gregojn, ĝi dormas en jurto kun sia posedanto, sed en urboj, hundoj estas plago kiu disvastigas peston, rabion kaj aldonas specon de hunda banditismo al la ekzotikeco de la urbo.

En Ulanbatoro estas multaj lamaoj, preskaŭ triono de la tuta loĝantaro, sed estas eĉ pli da hundoj.

Sun I-dzi estis skeptikulo. Li ne kredis, ke la animoj de la mortintoj reenkarniĝas en hundoj, kiel kredis la mongoloj, kaj li estis malfeliĉa, ke lia hundo vizitas la valon de morto.

Por dekutimigi sian "noĥoj"-on de la malbona kutimo, Sun nutris ĝin per kruda viando. Sed la kaprica hundo ankaŭ ne rapidis manĝi ĉi tiun manĝaĵon.

— Manĝu, huljo, manĝu vi, hundfiulo!

Sed la hundo, malgraŭ la zorgemaj invitoj de Sun, malvigle alproksimiĝis al la sanga viandopeco, kontraŭvole flaris ĝin, singarde lekis ĝin per sia lango plurfoje kaj retiriĝis en la ombron de la barilo.

Sun Yi-ji estis malkontenta.

Vere, ie profunde en sia koro li sentis kaŝitan timon pri tiu ĉi hundo. Nur nokte, kiam Suno devis iri al kontrabandistoj, kiujn li konis, por aĉeti malpermesitajn varojn, li trovis ian uzon por sia hundo. La hundo promenis kun li kaj protektis lin kontraŭ atakoj de siaj samspeciuloj.

La hundon timis kaj malŝatis ĉiuj vizitantoj de la Suna taverno. Nur la lamaoj, kiuj venis duope, kiel geamantoj, por trinki teon, kumison aŭ ĝui bonodorajn kuketojn, rigardis la hundon kun granda intereso kaj laŭdis ĝin pro ĝia bone nutrita aspekto.

Hundo en Mongolio estas sankta besto. La animoj de la mortintoj translokiĝas en ĝin. Kaj se hundo estas dika, bone nutrita, tio nur indikas, ke la

spiritoj de bonaj riĉuloj, feŭduloj, lamaoj, nobeluloj kaj baialikoj-herooj eniĝis en ĝin. Se hundo estas maldika, kun ulceroj, kun krustoj, ĝi estas malbona hundo, ĝin eniĝis la animoj de malriĉuloj, almozuloj, malbonaj animoj, kiuj estis pekuloj dum sia vivo.

Ne gravas, kia hundo ĝi estas: mizera aŭ dika, ĝi ne povas esti mortigita. Lasu la pekajn animojn de la malbonuloj suferi en la korpoj de mizeraj hundoj, kaj lasu la feŭdajn sinjorojn ĝoji en la korpoj de hundoj dikaj kaj sanaj.

Sed religio, krom siaj ruzaĵoj, ankaŭ havas ian inteligentecon: hundo povas esti mortigita kiam ĝi freneziĝas kaj povas infekti homojn kaj brutojn. Tiam malutila kaj malbona spirito ekposedas ĝin, kiun oni devas detrui, ĉar tion volas la granda Bogdo-dio.

Do la lamaoj amis kaj respektis la hundon de Sun.

La hundo povis senti kiam justulo mortis en Ulanbatoro. Li regule, post kelkaj tagoj, kuris al la valo de morto, kie ĝi manĝis homaĵon. Ŝajne, ĉar ĝi neglektis la malgrasajn korpojn de la pekuloj, ĝi estis tiel dika kiel la lamaoj pensis.

Sun I-dzi ne zorgis, kiun lia hundo manĝis en la mongola tombejo, sed li timis kaj naŭzis alproksimiĝi al la hundo kiam ĝi revenis de sia kanibala persekutado.

La hundo de Sun nutris sin nur per freŝaj kadavroj, kaj lia alveno en la valo de morto ĉiam estis triumfo. La malsataj sovaĝaj mongolaj hundoj, kaŝante sube la vostojn kaj grincante per flavaj dentoj, panike forkuris kiam la hundo de Sun alproksimiĝis al ili. Ĝi elektis la plej freŝan kadavron kaj festenis apud ĝi la tutan nokton aŭ la tutan tagon, se ne estus tro varme.

Unufoje ekestis por la lamaoj funebraj tagoj. La lamaoj ŝlosis sin en siaj dacanoj-monaĥejoj kaj minace blekis de tie per longaj trumpetoj. La Revolucia Unio de Mongola Junularo anoncis kampanjon kontraŭ la hundoj. La lamaoj komprenis perfekte, ke tiu kampanjo estis direktita rekte kontraŭ ili, kontraŭ lamaismo.

La junuloj, armitaj per revolveroj, fusiloj kaj klaboj, marŝis tra la urbo. Pafoj, hundbojado kaj ululado, la krakado de klaboj sur la glataj dorsoj de la hundoj resonis tra la bazaro kaj ĉiuj stratoj kaj anguloj de la urbo. Senkompata milito estis deklarita kontraŭ la hundoj.

La batalado daŭris kelkajn tagojn. Dum kelkaj tagoj la lamaoj ne kuraĝis

eliri el sia fortikaĵ-dacanoj. Nur kiam la batalado kvietiĝis kaj la skoltoj raportis, ke ĉio trankviliĝis, la lamaoj marŝis el la dacanoj.

Ili aranĝis la marŝon kun pompo, kun la tuta koloreco kaj soleneco, kiujn ili kapablis.

Antaŭe marŝis lamao kun glatrazita kapo, vestita tute ruĝe. Li portis grandan religion flagon *dvaĵon*. Malantaŭ li, kun ruĝaj, flavaj kaj bluaj ombreloj sur tre longaj teniloj, marŝis aliaj lamaoj, kaj inter ili marŝis infanoj kun razitaj kapoj – lernantoj de teologiaj lernejoj, kun malgrandaj dvaĵetoj enmane. Ĉiuj vestitaj per tute novaj ruĝaj roboj.

Poste venis kvar lamaoj portantaj du longajn trumpetojn.

La unua paro da lamaoj portis la larĝajn antaŭajn partojn de la trumpetoj, la dua paro blovis en la longajn, maldikajn tubojn, kiuj ekfunkciigis ilin. La trumpetoj estis pezaj, kaj oni devis havi bonajn pulmojn por blovi en ilin, ĉar la sono, kiun ili faris, estis dika, laŭta baso, pri kiu nur la kornoj de maraj vaporŝipoj povas fanfaroni.

Apud ili marŝis trumpetistoj, blovante stanajn trumpetojn, kiuj evidente estis alportitaj ĉi tien el eŭropaj infanludilbutikoj.

Poste venis du tamburinoj. Ili estis kelkfoje batitaj per bastonetoj, kio aldonis al la kakofonio. La sonoj de la frapinstrumentoj, kiuj aspektis kiel standardoj faritaj el kupraj cimbaloj, plenigis la lamaan tumulton per tintanta sono. Malantaŭ ili venis tuta amaso da lamaoj kun kupraj cimbaloj en la manoj, subtenante ĉi tiun primitivan orkestron per la tintado de kupro.

Sed malgraŭ ĉi tiu soleneco, estis klare, ke lamaismo finiĝas. La mongoloj piedirantaj kaj ĉevalrajdantaj, kiuj hazarde troviĝis sur la vojo de la procesio, rigardis indiferente la lamaojn, ne montrante al ili ian ajn respekton.

Biciklantaj mongolinoj subite elrajdis de-malantaŭ la stratangulo, faligante la konfuzitajn manifestaciantojn. Saltante kaj kurante trans la straton, la lamao-gvidantoj provis konservi ordon, kion ili sukcesis kun granda malfacileco.

Fine, tri aŭtoj, unu post la alia, eliris el la stratangulo, surdigante la muzikon de la marŝo per siaj sirenoj kaj polvonuboj, difektis la tutan lamaan solenecon.

La kontraŭhunda semajno havis mirindajn rezultojn. En la ĉefurbo de Mongolio, Ulanbatoro, kvanto da hundoj konsiderinde malpliiĝis.

Antaŭe, oni povis defendi sin kontraŭ aro da hundoj atakantaj pasanton nur mortigante la gregan gvidanton.

Kiam pluraj hundoj atakis, oni devis kaŭri, poste la hundoj haltis kaj atendis ĝis la persono leviĝis. Post kelkaj paŝoj, oni devis denove kaŭri, ĉar la hundoj tuj atakis.

Nun la hunda minaco estis rompita de la revolucia junularo de Mongolio. Ĝi estis averto al la lamaoj redukti sian apetiton.

Mirakle, la hundo de Sun I-dzi restis viva.

Ĝi saĝe atendis la pogromfinon en la korto de Sun malantaŭ alta barilo kovrita per flava argilo.

La lamaoj, kiuj poste venis ĝui kumisojn kaj kuketojn en la taverno de Suno, estis plaĉe surprizitaj kiam ili vidis la hundon vivanta.

Ili komencis trakti ĉi tiun hundon kun eĉ pli granda respekto.

Baldaŭ la maljuna Sun I-dzi mortis, ne atendante ke li riĉiĝos kiel nordĉino.

La hundo kondukis Sun-on al la tombejo kaj kuŝiĝis apud li, protektante lin kontraŭ la avideco de aliaj hundoj.

La hundo de Sun kuŝis tie longe, pensante pri kiel eliri el tiu malagrabla situacio.

Ĝi lekis Sun-on plurfoje, sed li ne vekiĝis. Tiam la hundo malrapide kaj zorge ronĝis Sun-on ĝis de li restis nur malbela seka skeleto.

La eliro el la malfeliĉa situacio, kiun la hundo de Sun trovis, estis fatala. Post kelkaj tagoj, la hundo maldikiĝis, krustiĝis, velkis kaj mortis en terura agonio.

La lamaoj diris jenon:

Sun I-dzi estis malbona, pekema homo, li verŝajne tro multe postulis de ni pro kumiso kaj kuketoj!.. La hundo faris eraron, ĝi ne devus esti manĝinta sian mastron, ĉar per tio ĝi kolerigis la beliebilik-diaĵon!..

Esperantigis V. Pajuk

RECENZO

La ribelema raŭpeto

Maria Nazaré Laroca

Sales, Dirce. La ribelema raŭpeto/Dirce Sales; traduko de Paulo Sergio Viana; ilustraĵoj de Bia Ballot. – 1ª eld. San-Paŭlo, Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, 2025.

Multaj homoj eble pensas, ke infanlibroj celas nur infanojn, sed tio ne estas vera, kiel ni povos ekscii per legado de la alloga kaj pripensiga rakonto, nome "La ribelema raŭpeto", originale verkita de Dirce Sales, en la portugala, kaj majstre tradukita de Paulo Sergio Viana en Esperanton. La ĉarmaj ilustraĵoj de Bia Ballot estas nemalhavebla parto de la verko.

Ni resumu la ĉarman rakonton. Lala estas aŭdaca kaj senpacienca raŭpeto, kiu insistas pri kreskigo de paro da flugiloj por plenumi sian revon flugi. Ŝi jam laciĝis grimpi arbon por rigardi la mondon de supre. Ŝi eĉ studis aerodinamikon kaj kolektis materialojn por konstrui du manfaritajn flugilojn, spitante Patrinon Naturon, kiu estis kolerigita de tia malrespekto al siaj saĝaj Leĝoj. Ekestas do konflikto inter la malgranda Lala kaj la granda Gardanto de Naturo, kiu riproĉis ŝin:

— Kion vi pensas, ke vi faras, Lala?

— Paron da flugiloj, Panjo Naturo.

— Ĉu vi emas kontraŭi miajn Le-

(Daŭrigota sur la paĝo 30)

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler

Demando

Participoj kun substantiva finaĵo ordinare aludas al homoj. Ekzemple: *amato* = amata homo; *honorato* = honorata homo; *kuranto* = kuranta persono; *staranto* = staranta persono ktp.

Ĉu oni rajtas uzi substantivan participon ankaŭ por bestoj kaj objektoj? Ĉu oni rajtas uzi la esprimon *amato* por dorlotbesto?; *honorato* por grava verko?; *kuranto* por ĉevalo?; *staranto* por palaco?

Respondo

Plej oportune estas transskribi la klarigon donitan de PMEG: "Aktiva participo kun O-finaĵo montras la *sencan subjekton* de la ago aŭ stato. Pasiva participo kun O-finaĵo montras la *sencan objekton*. Normale temas pri *persono*".

Pri la temo, Zamenhof donis la du jenajn respondojn:

"Participo-substantivo en Esperanto signifas ordinare *personon* (aŭ objekton, kiu plenumas ian funkcion); se ni deziras doni al la participo alian sencon, ni devas uzi sufikson (ekzemple *aĵ* aŭ *ec*). Tial, laŭ mia opinio, la vorto 'estonto' povas signifi nur 'estonta persono', sed ĝi ne povas signifi 'estonta tempo' aŭ 'estonta afero', kiujn mi rekomendus traduki per la vortoj 'estonteco' kaj 'estontaĵo'." (*Oficiala Gazeto* III, 1911, p. 291)

"Se anstataŭ la kunsufiksa vorto 'estanta' ni uzus ian simplan sensufiksan vorton (ekzemple: 'nuna'), tiam ĝia substantiva formo kompreneble

neniel povus signifi homon, sed povus signifi nur abstraktaĵon; sed la sufikso de participo enhavas en si mem la ideon pri io konkreta (iu aŭ io, kiu … as), sekve verbo, substantivigita per participa sufikso, povas esprimi nur konkretaĵon (ulon aŭ aĵon). Kaj ĉar en la grandega plimulto da okazoj la participa sufikso, laŭ sia senco mem, esprimas ulon, tial laŭ la principo de sufiĉo ni ne bezonas konstante aldonadi al ĝi la sufikson 'ul', kaj nur en tiuj maloftaj okazoj, kiam per la dirita sufikso ni volas esprimi ne ulon, sed aĵon, ni aldonas la sufikson 'aĵ'. (*Oficiala Gazeto*, IV, 191:1, p.1)

Sekve, laŭ la ĉi-supraj klarigoj, oni rajtas uzi substantivan participon ankaŭ por bestoj kaj objektoj, kondiĉe ke sencorilato estu klara kaj subtenebla. Specife, la formoj *amato*, *kuranto* kaj *staranto* kiel rilataj al, respektive, dorlotbesto, ĉevalo kaj palaco estas akcepteblaj. Tamen oni memoru, ke ankaŭ la kunteksto gravas por helpi difini, ĉu temas pri persono, besto aŭ objekto. Aliflanke, *honorato* anstataŭ *verko* ŝajnas malfacile komprenebla.

Malgraŭ la malrekomendo Zamenhof-a pri *estonto* uzata kiel tempesprimo, jam frue aliaj aŭtoroj komencis uzi ĝin kiel sinonimon de *estonteco*. Jen kelkaj ekzemploj:

[…] Zonjon kun volonto / Mi akceptis, edukis, zorgas pri ***estonto*** *[…]* (Grabowski, *Sinjoro Tadeo*, 1918)

La ***estonto*** *tute ne igis min maltrankvila, ĉar ĉio marŝadis bone.* (Bulthuis, *Idoj de Orfeo*, 1923)

La sennaciismo, samkiel la socialismo, estas ia anticipo en ***estonton****.* (Lanti, *Vortoj de Kamarado Lanti*, 1931)

Do mi estis forsendita kaj mi ektremis pro mia ***estonto****.* (Szathmári, *Vojaĝo al Kazohinio*, 1938)

Kaj same ĝi staros tie kaj velos tra la spaco en la epokoj de la ***estonto****, kiam la nuna mondo ne ekzistos plu*. (Engholm, ***Vivo vokas***, 1946)

Ni sekure vojaĝis al ***estonto****, kiu nin senmanke apartigos.* (Štimec, *Ombro sur interna pejzaĝo*, 1984)

[…] sed ĝi bonaŭguras por la ***estonto*** *de niaj arkivaj trezoroj kaj ilia utiligebleco.* (*Revuo Esperanto*, 2008, 1)

[…] li ne volis forĵeti sian ŝancon pri promesplena ***estonto*** *por kelkmonata amuziĝo […]* (Löwenstein, ***La memoraĵoj de Julia Agripina***, 2021)

Ankaŭ la formo *pasinto*, uzata sinonime al pasinteco, estas ofta:

Per voĉoj de ***pasinto*** *ekparolis ĉie.* (Grabowski, *Sinjoro Tadeo*, 1918)

*Tiam ili parolis pri **pasinto**, nuno kaj estonto.* (Engholm, *Homoj sur la tero*, 1932)

*Mi rimarkis, ke ni ĉerpas el la **pasinto** multan utilan sperton […]* (Szathmári, *Vojaĝo al Kazohinio*, 1938)

*Jes, estis li, pri kies **pasinto** mi aŭdis de li mem kaj parte de aliaj […]* (Szilágyi, *Vespera ruĝo anoncas ventegon*, 1950)

*Temas, tamen, pri tradicia aranĝo kiu estis multe pli ofte realigata en la **pasinto** […]* (*Revuo Esperanto*, 2002)

*En la **pasinto**, la sociaj retoj ebligis ĉirkaŭiri cenzuron kaj eviti la ŝtatosubpremon.* (*Le Monde Diplomatique en Esperanto*, Marto 2020)

Aliaj formoj, malpli ofte uzataj por esprimi tempon, estas *estanto* kaj *estinto*:

*Ĉi tie kunfluiĝas la pasinto kun la **estanto**.* (Varankin, *Metropoliteno*, 1933)

P*asinto, **estanto** kaj estonto interplektiĝas.* (*Le Monde Diplomatique en Esperanto*, Oktobro 2010)

*Mi pensis pri la **estinto** kaj miris, ke ĉio fariĝis tiel bona.* (Bulthuis, *Idoj de Orfeo*, 1923)

*Li daŭre pensis pri la **estinto** en la geedzeco […]* (Szilágyi, *Vespera ruĝo anoncas ventegon*, 1950)

Daŭrigo de la pago 28 Recenzo

ĝojn? (...) Lala, komprenu: la Naturaj Leĝoj havas sian precizam tempon por plenumiĝo.

Tamen la ribelema raŭpeto obstinas en sia pasia deziro malgraŭ la kolero de Panjo Naturo ...

Kaj do, ĉu Lala sukcesos flugi? Jen bona oportuno por ke vi malkovru la finon de tiu belega rakonto, kiu proponas al ni profundajn pripensojn pri la regado de senpacienco, la bezono atenti la limojn de nia korpo; kaj nin invitas ame respekti Panjon Naturon.

Poemoj de Jarina Ĉomohuz

Elukrainigis Petro Palivoda

la poezio de nia epoko
estas mistero perdinta la rimon
perdinta la ritmon
scianta ke nur la sango rimas
kun ĉio
se iam vi tenis ĝin en la manoj
la poezio de nia epoko
estas nudigita senco el la baroka epoko
ruĝnigra laŭ koloro
kurbiĝita
en la formo de milita rondo

***

la tempo kiun ni travivis estas alia dimensio
kiel plenskribita per infanaj manoj
kajero en la ĉeleto

---

vi havas dudek du
ne jarojn
sed cirklojn sur spiralo
viaj okuloj ĉesis vidi sonĝojn el libroj
la miaj estas en la sango de la patrino
kiam en la profundo de la grundo forbrulas
per blua fuelo
la tero de la kupra epoko

mi iras al vi tra
pecegoj frakasitaj de glacimontoj
tiu kiu ankoraŭ ne naskiĝis
sed estos via

[rekono]

kiam mi demandis la ĉielon pri vi
demando estis malnova kaj simpla
ĉu ni restos kune? —
al mi aperis karto
kun kandelo en la nokta mallumo
se tio ne estus vi
mi eble estingiĝus
pro la signo de la preĝeja silento de morto,
kiun signas kandelo por ĉiuj soldatoj.

sed tio estis vi —
kaj mia koro varmiĝis
ĉar mi sciis ke tiu karto
estas la sola kandelo kiu lumigas
vian domon en la montoj

la domon inter la montoj
kien kondukas vojo tra step' kaj marbordoj,
tra minejoj kaj grenadfuneloj

sola kandelo ĉe la fenestro de via domo
atendas nin reveni de la milito,
en la domo inter la montoj,
kandelo signifas hejmon de ĉiuj loĝejoj

finfine
mi rekonis vin inter milionoj da homoj

Elukrainigis Petro Palivoda

Poeto ja, la Di-alvoko: malmodera Dorvalino Sen-Nocio

Paulo P. Nascentes

Kreive, klare, konvinke verki. Pasio de la malmodera Dorvalino Sen-Nocio, defio kiun malmultaj alfrontas. Se malmodera, kiel do klara, konvinka? Kreiva je la 16-a jaraĝo, nun sepdekjaraĝulo li sin demandas, kiel teni la atenton de Leganto, Legantino, laŭdifine ĉef-roluloj, sen fali en la ripetatajn formulojn: konflikto, dramo, intrigo, tempo, scenejo. Nu, tion eĉ Artefarita Inteligento faras, aŭ klopodas fari. Kaj do? Jen tio kion volas ĉi-tiu libro. Ĉu genro? Nu, ĉu difini ne estas fini *apertan verkon*?

Brulu vian kapon, kuiru neŭronon, Leganto! Ĉu tio estus novelo, kroniko, eseo, poeziaĵo, adoleskanta taglibro, skriba mensogaro, fikcio, ĉio kuna kaj miksita? Ĉu nenio tia? Eĉ ne risku la plej bonan alternativon. Mistero, se mistero estos, survivas, ridas pro la naiveco de aŭdacaj ĉion-sciuloj. Interkonsentu ni. Adjektivoj maskle aperos. Ili aplikiĝas al ĉiuj ekzistantaj aŭ inventotaj genroj. LGBTQIAPN+ estas siglo kies socian gravecon mi agnoskas! Luktojn, movadojn, komunumojn mi respektas. Sed, kaĵoli iun ajn mi tion ne faros, kia *Leganto, Legantino, impertinentulo, impertinentulino, impertinentul@*. Fi! Se vi multe bezonas, enfiksiĝu, enpakiĝu kie ajn estu komforta. Tiel diris Zaratustro. Tiel diris Dorvalino. Nu, parolis mi!

Ĉu verki estas arto? Ĉu memesprima sribaĵo, terapio? Skibu ĉion, kio venos al vi en la kapon kvazaŭ tio, kio sin elverŝas superpareren. Jen io ja terapia. Tio vere rilatiĝas al tavoloj antaŭe vualitaj, obskuraj, retenitaj. Sencenzure, *fiskribu* ĉion. Sen-halte, senpensi, dum ĉirkaŭ 10 minutoj ĉiutage. Tio eble permesos vin tuŝi vian aŭtentikecon, senvualigi sufokitajn voĉojn, elfosi trezorojn meze al koto, eventuala balbonodoro, putreco. Di-

amantoj ekaperas en marĉo. Ili postulas purigon, sekigon, poluron. Staras la defio. Ĉu vi ĝin alfrontos? Ĉu ĝi valoros la penon? Kial ne?

(Elĉerpaĵo el mia libro *Rabiscos poéticos de um Sem-Noção: o avesso do percurso*. Brasília-DF, Ed. Do Autor, 2024. Ĉapitro 1.)*.

LIBERA

Libera je ajna ligo je ajna tempo
mi pace foriras libera el pasinteco
libera el estonteco mi vivas kaj
spiras
en ĉi tiu estanteco eterna senfina
malobstina el pasintaj kontraktoj
nun mi vivas mian propran vivon
miajn proprajn aktojn
respondece pri tiu pardono en mi
naskiĝinta libera sen ajna ligo
al estinta tempo do al pasinteco
de num mi vivas en hodiaŭa nuneco
Tiel estu! Tiel estas!
Farite estu laŭ la Dia graco!

SENNOMA

Kiun nomon doni al tiu malkvieteco
kiun nomon, finfine, kiun nomon
ĝi lasas min tiel sendorma
timo pri kio, ĉu de l' finemo?

Kiun nomon kiun nomon
por tiu malkvietemo
kiun poemon kiun poemon
produktas mi min donacante
la pacon sen malordigo sen dilemo?

Kaj tiu maldormo en dormon falanta,
malsato pri io ajn, sed malsato,
defias la regnon de l' dio Khronos'
kaj de l' dio Kairos', aperanta-
malaperanta
kian miskoncerton imponas tiu
poemo?

La malkvieteco restu ja sennoma
sennoma la senkvieta timo
sennoma tiu dolor' kiu min konsumas
ne hontas mi kapitulacii
antaŭ la aroganta balzamo de l'
poemo.

(*)https://www.amazon.com.br/Rabiscos-po%C3%A9ticos-sem-no%C3%A7%C3%A3o-percurso/dp/6500945557

ENCONTRO DE ESPERANTISTAS NO VALE DO PARAÍBA

AAP-VR - Sede Social

Rua 35, nº 112, Vila Santa Cecília, Volta Redonda, RJ

Domingo - 9 de novembro 2025

Das 9h30 às 17h

Palestras | Oficinas | Leituras | Música | Convivéncia fraterna

Atividades literárias e artísticas

Café compartilhado e almoço livre

Aberto a iniciantes, aprendízes e veteranos

Organizaçáo: Clube de Esperanto de Volta Redonda

(24) 9 9918 2041

www.esperantovr.com.br

Apoio:

AERJ

easp Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

AAP-VR